



### **Kluba Programo:**

#### **septembro:**

- 4 John Wells: *Lingva Seminario*
- 11 Klubanoj: *Babil-vespero*
- 18 Renato Corsetti: *Esperanto: ĉu bona lingvo?*  
(1800h: konsilantaro)
- 25 Kvizo

#### **oktobro:**

- 2 Klubanoj: *Raportoj pri someraj renkontiĝoj*
- 9 Klubanoj: *Babil-vespero*
- 16 John Wells: *Lingva Seminario*  
(1800h: konsilantaro)
- 23 Ludvespero
- 30 David Thornell: *Origino de Halovino*

#### **novembro:**

- 6 Olga Kerzjuk: *La Esperanto Kolekto de la Brita Biblioteko*

### **Aliaj anoncoj:**

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 11a decembro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*



Raportoj de klubanoj pri someraj renkontiĝoj - 2 oktobro.

Ĉi-supre oni vidas bildojn faritajn de Arturo Prent, dum la SAT-kongreso en Nitra, Slovakio.

### **Esperanta Kalendaro:**

9-12 oktobro: Internacia Amikeca Renkontiĝo, Aylesford, Kent.  
Temo: "Manĝaĵoj". Informo: [anica\\_page@btinternet.com](mailto:anica_page@btinternet.com)

27 dec-3 jan 2016: 14a Novjara Renkontiĝo, Saarbrücken, Germanio. Informo: [www.esperantoland.org/nr](http://www.esperantoland.org/nr)

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babilo.

Kutima programo:

18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la

ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,  
50-52 Camden Square, NW1 9XB  
(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo London Overground: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close,  
Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray,  
11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB  
01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honora Vicprezidanto: Valerie Atkinson

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Matt Peperell, Olga Kerziouk, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) lek.sekretario@gmail.com;

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap\_esp-lek21@yahoo.co.uk,

Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry\_page@btinternet.com, anica\_page@btinternet.com,

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Vizitoj vere gravas en Esperantujo. Ekzemple, vizitoj de alilandanoj; vizitoj al kongresoj; la Pasporta Servo; ekskursoj gvidataj de samideanoj. Raportoj pri tiaj okazintaĵoj ankaŭ gravas, por ke aliaj samideanoj dividu la ĝuon de ies vizitoj kaj lernu pri aliaj lokoj kaj eventoj



Nu, baldaŭ LEKanoj raportos pri siaj spertoj, vizitinte diversajn landojn por kongresumi, sociumi, ekskursi ktp. Tio okazos je la 2a de oktobro. Venu kaj por raporti mem kaj por aŭskulti la aventurojn de viaj samklubanoj. Certe valoros prezentoj pri la ĵusaj Universala Kongreso kaj SAT-Kongreso. Ankaŭ viajn proprajn prezentojn sendube LEKanoj volus aŭskulti! Plej verŝajne videblos kaj vidindos fotoj kaj broŝuroj. Kaj ne timu demandi pri tiuj detaloj, kiuj plej interesus vin. Venu, por ĉio tio kaj eĉ pli.

Parolante pri venoj, du lastatempaj vizitintoj al la klubejo estas menciindaj. Unu estis juna anglino kaj lernantino el Banbury, kiu esploras la Esperanto-Movadon, por verki A-Nivelan disertacion. Ŝi interesiĝas pri la diversaj motivoj de Esperantistoj plivastigi la Internacian Lingvon en lernejoj kaj aliloken. Kvankam ŝia studado ne nepre inkluzivos lernadon de Esperanto, tamen ŝi evidente entuziasmas pri la Movado. Ŝajne, ŝi jam scipovas la francan, hispanan kaj portugalan; do eble ŝi efektive eklernos la nian. Ni vidu. Dua persono estis Eruda, hongkonganino kaj amikino de **KLARITA VELIKOVA**. Eruda informis nin multe, plejparte pri la religioj de Tibeto. Ŝiaj rakontoj pri la historio kaj rivalaj budhismoj de tiu lando ja pensigis nin, semante scivolemon pri pliaj informoj el Tibeto mem.

Bonŝance, tiu ĉi somero kunportis pli da aktivado kaj ĉeestantoj, ol kutime dum julio kaj aŭgusto. La vendredaj kunvenoj certe estis viglaj, bonetosaj kaj diverstemaj - malgraŭ la fakto, ke ĝuste lastatempe estis la 'for-sezono', por granda parto de nia kutima ĉeestantaro. Tio en si mem donis oportunajn okazojn ricevi plurajn sinproponojn por prelegoj dum la venantaj monatoj. Rigardu la ĉi-tiean programon, por evidentajfoje - kaj atendu eĉ pli da allogaĵoj ĝis la fino de la jaro kaj poste.

Feliĉan aŭtunon,

*David Thornell*